

## & Vilmunda balado:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 2754 paŝoj dum 29 minutoj. Norda Kantaro #4405. El feroa tradukis Martin Strid (2014). Duoble tradukiĝis strofo '45. Klarigojn vidu post la strofoj.>

### (#Melodio:

<1,6:34> (

/fami sofa fami mire; rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

)×81 )+

### (&Strofoj:

#### ..& Unua parto:

'1 Aŭ/skultu la baladon kiun ; bele aŭdigas lango ; dum mi baladas pri bataloj ; glavoj kantas en sango.

(×: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Nomata nome estis Jarmund ; reĝo de Gardaregno\* ; Jormund lia brava filo ; malmultaj same degnas. ....

'3 Jormund estis reĝa filo ; taŭga en ĉiuj portoj ; nomatas lia stala frato\* ; estis Vilmund forta. ....

'4 Estis moro en Gardaregno ; for en arbaron iri ; iris ĉiu en sia klano ; boacojn kaptakiri. ....

'5 Estis Jormund reĝa filo ; iris for arbaren ; lin Vilmundo poste sekvis ; ambaŭ por ĉason fari. ....

'6 Densa kaj malhela nebulo ; venis sur la landon ; Vilmundo kaj reĝa filo ; perdiĝis arbaron grandan. ....

'7 Iris en pli densa nebulo ; estis peza paso ; vaste migris sovaĝarbaron ; ĉio forigis de l' ĉaso. ....

'8 Jormund longe perde migris ; antaŭ ke vojon trovis ; trafis poste al la pado ; kaj kuri domojn povis. ....

'9 Aŭdis bruon kaj homparolon ; aŭskultis por plia klaro ; reĝaj viroj sur burgo staras ; vidis jen ŝiparon. ....

'10 Vidis ŝipojn nigravelajn ; laŭ la maro\* glitas ; komprenis laŭ malnova moro ; malpacon ĝi invitas. ....

'11 Vidis grandan ŝipan aron ; nigris korake\* veloj ; nun fariĝos ja batalo ; havenen ili celas. ....

'12 Velis en la maro ŝiparo ; al bordis apud ŝtono ; kuris sur la teron nigruloj ; ne postrestis unu. ....

'13 Faris siajn armebudojn ; apud maran randon ; ĉiuj estis kruelaj nigruloj\* ; survenintaj landon. ....

'14 Sin preparis al batalo ; sen malĝoje plendi ; dek duajn el la nigruloj ; al burga hejmo sendis. ....

'15 Rajdis haste kaj rapide ; mesaĝon por kapabli ; tiel venis en la halon ; reĝo sidis ĉetable. ....

'16 Respondis unu el nigruloj ; "Vi haltu manĝaĵon tranĉi ; atendu dum mi la mesaĝon ; de mia sinjoro lanĉu. ....

'17 Ŝildo vi min devas nomi ; povas mi glavon gvidi ; mi sendiĝis de Buro reĝo ; li regas Nigrujon bride. ....

'18 Aŭdis li en iu momento ; vi havas belan filinon ; neniu trovus en iu lando ; taŭgan pli fraŭlinon." ....

'19 "Ne kuraĝas Buro reĝo ; ŝin por peti stari ; mi preferas estro esti ; kaj kiel ni diras fari." ....

'20 "Se vi ne filinon vian ; al lia mano portos ; ni ŝin prenos de la burgo ; malsupren al la bordo. ....

'21 Vi aŭskultu Jarmund reĝo ; lin ne piku mave ; li fajrigos vian burgon ; kaj vin hakos glave. ....

'22 Ĉar ne havas vi robuston ; kontraŭ li fieri ; via viv' je lia graco ; kaj la oro kaj tero. ....

'23 Tio estus mortontfaro ; kontraŭ li provoki ;  
lian haŭton tranĉilo ne mordas ; pli ol tranĉilo  
rokon. ....

'24 Vi ne havas homan viron ; en lando sub  
ĉielo ; kiu kontraŭ li kuraĝas ; stari en duelo."  
.....

'25 Pelas sango al hejma reĝo ; li ekternas  
plaŭde ; "Fanfaroni ja malcertas ; kiu venkon  
laŭdos. ....

'26 Jormund mia brava filo ; gardas fratinton  
karan ; ne respondos mi hodiaŭ ; li forestas  
arbare. ....

'27 Filo mia arbare forestas ; al si ludon levas ;  
kiam li venos hejmen al hal' ; respondon li  
ricevos." ....

'28 "Ne estos bone al Buro reĝo ; peti  
tempabundon ; metos li fajron al via burgo ;  
estingos vin kiel hundon. ....

'29 Li ne vojaĝos al via domo ; rivera ligna  
pompo ; li vin prenos en siajn manojn ; kaj vin  
en pecojn rompos." ....

'30 Tiuj fraŭloj rajdis for ; el nigrulregno estis ;  
poste venis reĝofil' ; novaĵojn lin oni atestis.  
.....

'31 "Aŭdu Jormund, filo mia, ; kion bonan  
konsili? ; Ĉu oferu ni batalon ; kaj frapu  
kontraŭ ili?" ....

'32 "Jes, oferu ni batalon ; sen alion klopodi." ;  
Unua parto kantita estas ; sed poste restas por  
odi. ....

'33 Unua parto finita estas ; longa fariĝas odo ;  
ekas ni alian parton ; kaj aŭdos epizodon. ....

## **..& Dua parto:**

'34 Jormund igis kolekti trupon ; kunen en  
noktvualo\* ; antaŭ ol eklumis tago ; pretis li  
por batalo. ....

'35 Buro vekigis en sia loĝo ; antaŭ ol lumis  
klare ; vokas sian rabistaron ; ke ili baldaŭ  
ekstaru. ....

'36 Rompis\* el la loĝo ili ; mordis ŝildojn  
dentoj ; berserkoj\* kaj karbmorduloj ; burgon  
violentos. ....

'37 Jormund rajdis antaŭ trupo ; nigruloj volis  
egale ; renkontigis sur kampa tero ; kunrompis  
en batalon. ....

'38 Faris plej malmolan batalon ; rompis  
ŝildojn, glavojn ; kiu falis per du ŝultroj ;  
morton sur tero havas. ....

'39 Estis Jormund reĝofilo ; plej duris en  
tumult' ; li faligis el nigruloj ; bravajn virojn  
multajn. ....

'40 Neniu liajn hakojn toleris ; sed ĉiuj falis  
platon ; rajdis profunde en armeon ; kaj falĉis  
vastan straton\*. ....

'41 Estis Jormund reĝofilo ; impetis en armeo ;  
por si falĉis vastan straton ; ĝis la truptrofeo\*.  
.....

'42 Ŝildo estis berserko kiu ; nigrulan flagon  
havis ; kuris kontraŭ Jormund li ; per lanco  
celis mavi. ....

'43 Li pikis lin per taŭga lanco ; malbonis ĝin  
proksimi ; Jormund saltis alte supren ; kiel fari  
li kutimis. ....

'44 Lanco staris en tero fiksa ; tiam li hezitis ;  
Jormund hakis per ambaŭ manoj ; kiam li tion  
vidis. ....

'45a Hako venis al du ŝultroj ; vertebroj ek  
apartas ; tiam falis berserk Ŝild' ; li kampe  
kuŝis morta. ....

'45b Hako venis al du ŝultroj ; disigis  
vertebrojn ; tiam falis berserk Ŝild' ; li kampe  
kuŝis funebro. ....

'46 Fendis Ŝildon berserkon li ; disen en  
partojn du ; tion vidis Buro reĝo ; proksimis lia  
situo. ....

'47 Kuris li kontraŭ Jormund cele ; lian kapon  
fendi ; hakis sur la oran kaskon ; grandajn  
sparkojn sendis. ....

- '48 Sparkoj flugis forĝejfajre ; multis susuro brua ; flamo fiksiĝis en arbaro ; ekbrilis fajro detrua. ....
- '49 Tiam aŭdeblis longan vojon ; bruo de batal' ; Jormund reĝofilo trovas ; ke lin ne mordas ŝtal'. ....
- '50 Jormund reĝfil' glavon svingis ; uzas forton ĉion ; hako venis Buron reĝon ; sur la nudan kranion. ....
- '51 Hako venis nudkranion ; kiel glita tuŝo ; plukis nazon, makzeloston ; dentoj elstaris el buŝo. ....
- '52 Reĝofilo laca malvarmis ; ĉar vundojn ricevis li ; svenis sur la verdan kampon ; en longa senkonscio. ....
- '53 Falis nun armeo burga ; kriis nigrular' ; puŝis antaŭen akraglave ; kaj fajron al burgo faris. ....
- '54 Vilmund arbare perda estis ; nun al haloj venis ; ek nigrulojn kaj la farojn ; iliajn li komprenis. ....
- '55 Vilmund nun eksciis pri ; ĉe burgo batalo ruĝa ; pri reĝofilo faligita ; kaj homoj malĝoje fuĝas. ....
- '56 Tiuj novaĵoj al li venis ; lian sangon ekscitis ; rapidas li en granda kolero ; kaj vestas sin por militi. ....
- '57 Vilmund prenas dikan kaskon ; sur sian kapon metas ; kaj kvaroblan kirason ringan ; tiel heroo preta. ....
- '58 Estis Vilmund, alta heroo ; lia sango varmis ; li rapidis al batalo ; kiu lukton armis. ....
- '59 Li terure premis antaŭen ; perlance kaj perglave ; kuraĝigis tiujn ki fuĝis ; returni kontraŭen brave. ....
- '60 Vilmund kuris armeon antaŭen ; dishakis li kirasojn ; kuris kontraŭ la nigruloj ; ili lin fuĝis amase. ....
- '61 Ne toleri povis kaskoj ; kion Vilmund faris ; fendis bruston, fendis ventron ; pinto en teron staris. ....
- '62 Vilmund impetis en armeon ; Buro vidis perdon ; falis nigruloj de piedoj ; kiel falĉe herbo. ....
- '63 Kuris li tiam kontraŭ Vilmund ; kontraŭ lia avanco ; unu l' alian dure frapis ; per kaj glav' kaj lanco. ....
- '64 Hakis dense vivovigle ; jam batalbordune ; fajro fumis el glavoj kiam ; eĝoj klakis kune. ....
- '65 Buro reĝo glavon svingis ; baton alvilmundan ; hako venis en vizaĝon ; verŝis sangon multan. ....
- '66 Kiam Vilmund ekvundiĝis ; svingis li sen brid' ; palpas trovi Buron reĝon ; granda la rapido. ....
- '67 Palpis trovi Buron reĝon ; granda lia hasto ; glavo flugis el la manoj ; en arbaron vastan. ....
- '68 Glavo flugis longan vojon ; mane ĝi ekmankis ; palpas li post la hakilo ; kiun fiksas flanke. ....
- '69 Vilmund svingas la hakilon ; bonis ĝi sen rusto ; li ekbatas Buron reĝon ; ŝtalo staris el brusto. ....
- '70 Ne ĝis la toraka osto ; kiam trafis haŭton ; reĝo donis grandan krion ; ekstere kaj ene laŭtan. ....
- '71 Buro reĝo ekvundiĝis ; grandan krion liveris ; Vilmund uzis ambaŭ manojn ; ŝtalo ne toleris. ....
- '72 Pezis hako hakmartela ; maleraris lerte ; kasko rompiĝis de Buro reĝo ; staris martelo en verto. ....
- '73 Kiam Vilmund faligis ; Buron reĝon teren ; li sin kontraŭ nigruloj turnis ; kaj ĉiujn for konkeris. ....
- '74 Prenis aĵojn, armevestojn ; vaste kampe kuŝis ; prenis oron kaj trezorojn ; ne nombreblis buŝe. ....
- '75 Prenis oron, armevestojn ; ne nombreblis buŝe ; venis ili al Jormund ; vidis kie li kuŝis. ....
- '76 Kiam en li vivforton sentis ; malpezis kormalĝojo ; sub lin sternis larĝan silkon ; kaj portis en burgon voje. ....
- '77 Portis hejmen kaj metis lin ; en liton sub domtrabo ; "Nun transprenu, bona fratino ; flegu malsanan knabon." ....
- '78 Ŝi dum tagoj flegis lin ; kaj flegis lin dum du ; sesan tagon de sepa semajn' ; li iris kirason bluan. ....
- '79 Sesan tagon de sepa semajn' ; li iris kirason bluan ; ŝi kondukis lin en la halon ; knabon vidi 'stis ĝuo. ....

'80 Sesan tagon de sepa semajn' ; lin vestis  
kiraso nova ; ŝi kondukis lin en la halon ;  
knabon vidi povan. .... )

### <& Klarigoj al Vilmunda balado:

Feroa dancobalado. Toreshavenan version  
notis Marius Jóanesarson. Duoble tradukiĝis  
strofo '45.

(\*):

'2 Gardaregno: Aro da kortoj aŭ fortikaĵoj  
(alivorte burgoj) de svedaj vikingoj laŭ riveroj  
en hodiaŭaj Ukraino kaj nordokcidenta  
Rusujo. Origina ĉefurbo estis Holmgård (=  
Novgorodo), poste Kievo kaj nuntempe  
Moskvo.

'3 Frato: Metafore pri ĉevalista kunlaboranto.

'10 Maro: Gardaregno ne situis ĉe maro sed laŭ  
riveroj. Sed Ferooj, kie travivis ĉi balado, estas  
maraj insuloj sen veleblaj riveroj.

'11 Korako estas tute nigra birdo kaj do  
metaforas pri nigreco.

'13 Kruelaj: timigaspektaj. Nigruloj: Temas pri  
malhela haŭtkoloro, kvankam ne certas, ke tio  
estas historie korekta.

'34 Noktvualo: nokta malhelo.

'36 Rompis: ŝire kaj subite malfermis. ;  
Berserko: amokulo, heroo freneze luktema,  
maltimanta morton kaj eĉ mordanta sian ŝildon  
manie.

'40 Strato: Senbara trairejo.

'41 Truptrofeo: La feroa originalo diras na  
"merkismann", tio estas markulo, do tiu kiu  
portas la signon de la trupo. >